

Artikolo de Claude Piron en *Eŭropa Dokumentaro*:
De sudaĉo fi-norden

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 568, 1974.08.28 & 31

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Sub la enigma titolo *De sudaĉo fi-norden* aperis artikolo de sinjoro Claude Piron en la revuo *Eŭropa Dokumentaro* de majo 1974. Temas pri senpretenda eseeto pri la bezono, kiun havas la homo sin konsideri kiel sudulon aŭ nordulon.

A.- Claude Piron estas samtempe tradukisto ĉe mondorganizaĵo kaj psikologo ĉe la Psikologia kaj Edukscienca Lernejo de la Ĝeneva Universitato. La venontan jaron li gvidos en La Chaux-de-Fonds kurson pri tradukado el kaj al Esperanto.

Cl.- Post enkonduko, kiu rilatas al situacio ofta en mondkongresoj, Claude Piron konstatas, ke la nordeco aŭ sudeco rilate la naciajn aŭ du-tri-landan unuon estas psike multe pli grava ol rilate la tutan terglobon. Ne temas pri la klara ideo, bone pripensita, ke ni situas tie aŭ tie ĉi, sed pri nebula, apenaŭ konscia impresoj aparteni al tiu aŭ alia sektoro de la spaco. Valono sentas sin sudulo, kvankam li troviĝas norde sur la mapo de la franca kulturo, kies membro li estas. Same, marsejlano sin perceptas suda, kaj norda la novjorkano, kiom ajn protestu la faktaj latitudoj.

A.- Al tiu situo asociiĝas tuta serio da kvalitoj, kies rilato al spaca pozicio estas almenaŭ neklara. La homoj, kiuj sentas sin norduloj, vidas en si plej ĝenerale la trajtojn de efika, racia, socie progresema homo, kapabla taŭge organizi kaj agi senpasie. Ili rigardas al la suduloj kun supereca mieno, vidante en ili malseriozulojn animatajn ĉefe de la deziro ĝui la vivon kaj jongli per vortoj anstataŭ ataki la problemojn en realisma maniero. Simetria idearo retroviĝas sude rilate la homojn de l' nordo : « La nordulojn difektas fundamenta senviveco. Ili sin tenas rigide en ĉiuj kampoj de la vivo, mankas al ili tiu vigleco, tiu fajro, tiu ĝojo vivi, kiuj karakterizas la sudulojn, kaj tiel plu... »

Cl.- Se estas iom da vero en ĉi tiuj observoj, stariĝas la demando : de kie venas tiu stranga maniero juĝi sin kaj la aliulojn ?

A.- Responde Claude Piron esprimas kelkajn hipotezojn. Li unue konstatas, ke ne temas pri kultura aŭ etna sintenoj, nek pri religiaj aŭ trinkkutimoj – verkistoj provis ekzemple dividi la mapon laŭ vina kaj biera prefero por klarigi tiujn sentojn. Estas universalaj sintenoj, kiuj katakterizas ĉiujn popolojn. Claude Piron opinias, ke ilia vera kaŭzo estas psika.

Cl.- Tiuj sentoj pri nordeco aŭ sudeco respondas al fundamentaj homaj bezonoj ; orientiĝi kaj havi identecon. Ili fakte estas nur malsamaj aspektoj de la neceso respondi la demandon : « Kiu mi estas ? » Estas inter du kaj kvin jaroj, ke la infanoj penas solvi tiun sfinksan problemon. La infanoj kreas al si bildon pri si mem, kiu havas sekvon sur la psikologion de la plenkreskula vivo.

A.- La baza unuo, rilate kiun oni sin konsideras suda aŭ norda, ĝenerale estas la lando aŭ malgranda grupo de landoj. Tio ne povas nin mirigi. La nacia aparteno ja estas reliefigata ekde la frua lernejo, kaj multegaj detaloj de la ĉiutaga vivo rememorigas nin, ke ni estas anoj de tiu aŭ alia lando aŭ landogrupa. Sed la kaŭzo, pro kiu la homo emas aljuĝi preskaŭ

universale precizajn trtaĵojn al norda aŭ suda aneco ne estas evidenta, Claude Piron ekzamenas diversajn faktorojn.

Cl.- La bildoj elvokataj de la klimato - aŭ de la ventoj - povas esti unu el ili. La sudo pensigas pri suno kaj varmo, kaj ankaŭ pri ferioj. Estas normale ĝin asocii kun sentoj de fantazio kaj senzorgo. Male la nordon signas malvarmo, kiun oni facile ligas kun la ideo de cerba aktiveco, eĉ se nur pro tio, ke la statoj malfavoraj al ĉi-lastata, kiel ebrieco aŭ ekscitiĝo, sentigas varmon ĉekape. Al tio aldoniĝas longa literatura tradicio, kiu igas nin asimili la ŝablonan kontraŭstaron inter varma koro kaj cerbo malvarma.

A.- Claude Piron listigas alian faktoron, kiu povas ludi gravan rolon en la formado de la penskutimoj pri sudeco kaj nordeco. Ni citas ilin : « *Oni scias, ke la mensa bildo pri la propra korpo – kiun la spikologoj nomas « korpa skemo » - donas al la homo lian unuan rederencbazon por la kompreno de ĉio spaca. Tiu referenco konstruiĝas dum la frua infaneco, kaj ĝi restas la fundamento, sen kiu ni ne povus vivi en tridimensia mondo. Al la korpa skemo fiksiĝas tiuj ide-asocioj, kiujn ni menciis parolante pri la klimato : la kapo fariĝas organo por pensi kaj la krunko privilegia loko de ĉiuj eksterpensaj psikaĵoj : sento, emocio, seksaj impulsoj, kaj tiel plu.* » Claude Piron montras, ke tiu koncepto estas kontraŭa al la fiziologio.

Cl.- Li daŭrigas : « *Nu, rigardu vian ombron, kiu estas la plej ofta vido de via korpo sur horizontala plano : la kapo estas plej malproksime de vi. Same kiel nordo, kiam vi rigardas mapon. [...] Nekonscie ni atribuas al la mapaj direktoj la samajn primitivajn juĝojn, kiel al la partoj de nia korpobildo.* »

A.- Laŭ tiu hipotezo, la tuta procezo inkluzivus jenajn kvar punktojn :

Cl.- Unue : la individuo eksentas sin membro de geografie difinebla homgrupo. « *Mi estas italo* » ; « *Mi estas ĉino* ».

A.- Due : li difinas sin ano de la norda aŭ suda parto de la koncerna geografia unuo. « *Mi estas norda italo* » ; « *Mi estas suda ĉino* ».

Cl.- Trie : Li aljuĝas al si la karakterizojn elvokitajn de la responda parto de la korpa skemo. « *Ni nordaj italoj kapablas racie plani kaj entrepreni* » ; « *Ni sudaj ĉinoj scias ĝui la vivon kaj nia kuirarto havas egan valoron* ».

A.- Kvare : li adoptas por la simetria landano la trajtojn asociatajn al la alia parto de la korpa skemo . « *La suditaloj estas maldiligentaj fuŝuloj* ». « *La nordaj ĉinoj estas rigidaj, ili ne havas eĉ grajneton da fantazio.* »

Cl.- Kvina punkto estas aldonebla : eble la pli malpli konscia identiĝo al homtipo determinata samtempe de la propra situdifino kaj de la bildo, kiun la « kontraŭlokanoj » resendas al ni pri ni mem, naskas efektivajn pens-, sent- kaj ag-kutimojn, tiel ke la opinio de nordulo pri sudulo kaj inverse estas nur parte antaŭjuĝa ; ĝi parte ankaŭ konformas al la vero.

A.- Jen tre resume kelkajn citaĵojn el artikolo sespaĝa, kiun vi povos trovi en la revuo **Eŭropa Dokumentaro** de majo 1974.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !